Edward Lear,

# La Strig' kaj la Kato

*tradukita de Pejno Simono*

I

La Strig' kaj la Kato en verda boato
ekvelis kun kargo abunda,
mielo por manĝi kaj mono por ŝanĝi
en Angla bileto kvinpunda.
Sub nokta stelaro kun eta gitaro
ekkantis la Strig' pro inklin',
"Ho bela vi Kato! Ho mia amato!
Ho Kato vi ravas ja min,
ja min,
ja min!
Ho Kato vi ravas ja min!"

II

La Kat' aklamanta "Vi bird' eleganta!
Vi kantas ĉarmege ulule!
Ho ni geedziĝu! Hezit' ne estiĝu!
Sed havas da ringoj ni nule!"
Tra jaro plus tago ekestis vojaĝo
al land', kie kreskas bonguj',
kaj jen en arbaro renkontis la paro
Porkidon kun ring' en naztru',
naztru',
naztru'.
Porkidon kun ring' en naztru'.

. . .

Edward Lear,

# The Owl and the Pussy-cat

I

The Owl and the Pussy-cat went to sea
In a beautiful pea-green boat,
They took some honey, and plenty of money,
Wrapped up in a five pound note.
The Owl looked up to the stars above,
And sang to a small guitar,
"O lovely Pussy! O Pussy my love,
What a beautiful Pussy you are,
You are,
You are!
What a beautiful Pussy you are!"

II

Pussy said to the Owl, "You elegant fowl!
How charmingly sweet you sing!
O let us be married! too long we have tarried:
But what shall we do for a ring?"
They sailed away, for a year and a day,
To the land where the Bong-tree grows
And there in a wood a Piggy-wig stood
With a ring at the end of his nose,
His nose,
His nose,
With a ring at the end of his nose.

. . .

III

“Jen unu ŝilingo por via nazringo!
Ĉu bone?” La Porko kvitigis.
La tagon pli poste la paron senkoste
Kok’ Hinda sur monto ĵurligis.
De ment’ la foliojn kaj cent cidoniojn
ili manĝis per runca kuler’,
festenis lunlume kaj dancis brakume
sur plaĝ’ en la nokta aer’,
aer’,
aer’.
Sur plaĝ’ en la nokta aer’.

*Traduko de la Angla poemo “The Owl and the Pussy-cat” de Edward Lear en Esperanton de* PEJNO SIMONO *(Simon Edward Adrian Payne, ∗1941-12-23).*

*Arg-976-1967 (2014-03-13 21:45:19)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo troveblas en la retejo* `http://www.bompa.org/`.

III

“Dear Pig, are you willing to sell for one shilling
Your ring?” Said the Piggy, “I will.”
So they took it away, and were married next day
By the Turkey who lives on the hill.
They dined on mince, and slices of quince,
Which they ate with a runcible spoon;
And hand in hand, on the edge of the sand,
They danced by the light of the moon,
The moon,
The moon,
They danced by the light of the moon.

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas Edward Lear.*

*Arg-976-1966 (2014-03-13 21:55:44)*

*Pri la verkintgo vidu la retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Edward_Lear` *respektive* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Edward_Lear`.